

Vivo de libeloj

Libelojn (ĉeĥe "vážky") oni povas ofte vidi ĉe akvoj. Ili estas relative grandaj insektoj. Sur la kapo ili havas du grandajn okulojn; tio montras, ke la libeloj estas raboinsektoj. Ili kaptas malgrandajn insektojn dum flugo kaj voras ilin. Sur la brusto ili havas du parojn de grandaj flugiloj kun tre karakteriza retforma nervuro. Ilia abdomeno estas plej ofte maldika.

La ovoj estas metataj sur plantoj kreskantaj ĝis la akva surfaco. El ili eloviĝas larvoj. Ilia korpo estas plej ofte longforma. La larvoj vivas sian tutan vivon, kiu daŭras ĉe iuj specioj ĝis 5 jaroj, en akvoj, precipe stagnantaj aŭ malrapide fluantaj. Ili estas raboinsektoj, kaptas malgrandajn akvajn animalojn kaj voras ilin. Al la kaptado servas al ili labio, kiu estas longforma kaj normale faldita sub la kapo; la larvo povas ĝin elĵeti kaj kapti per ĝi sian predon. Elkreskantaj larvoj elgrimpos el la akvo, la haŭto sur ilia brusto krevas kaj aperas la matura libelo. Apenaŭ ĝi sekiĝas, ĝi ekflugas.

Ĉe ni vivas ĉirkaŭ 70 specioj de libeloj, kiuj estas memstara ordo de insektoj. La speciojn oni povas dividi en du diversajn grupojn, subordojn.

La unua subordo estas egalflugilaj libeloj. Al ili apartenas pli malgrandaj specioj de libeloj. Tiuj libeloj flugas kaj sidante starigas siajn flugilojn kiel tagaj papilioj, ilia abdomeno estas maldika kaj cilindroforma. Iliaj larvoj estas pli malgrandaj, kun maldika abdomeno, kiu havas tri folioformajn apendicojn ĉe la ekstremo. La apendicoj funkcias kiel traĥeaj branĝoj. La plej grandaj de la menciita subordo estas maldiklibeloj (ĉeĥe "motllice"). Ilia korpo estas ĝis 4 cm longa, metalverda, ĉe ni vivas du specioj. La flugiloj de la maskloj estas malhelaj, de la femaloj nur verdetaĵoj. Pli malgrandaj estas filinlibeloj (ĉeĥe "šídla") kaj rabistlibeloj (ĉeĥe "šídlatky"). Ili estos longaj ĝis 3 cm, iliaj flugiloj estas senkoloraj. La filinlibeloj estas niaj plej abundaj libeloj.

La alia subordo estas libeloj malegalflugilaj. Al ili apartenas la grandaj specioj. Ili flugas kaj sidas kun horizontale situantaj flugiloj, kiuj dum flugado vibras. Ili estas tre lertaj kaj rapidaj flugantoj. Iliaj larvoj havas pli dikajn abdomenon ol la antaŭa subordo, kun konuso sur sia ekstremo, en la konuso troviĝas traĥeaj branĝoj. Unu de la plej grandaj libeloj estas imperatora libelo (ĉeĥe "g!dlo krlovsk"), kun ĝis 6 cm longa verda korpo. Tre konataj specioj estas platventra libelo (ĉeĥe "vážka ploská") kaj kvarmakula libelo (ĉeĥe "vážka čtyřskvrnná"). La maskloj de la platventra libelo havas bluan abdomenon, la femaloj flavetan. Kvarmakula libelo havas sur siaj flugiloj brunajn makulojn.

Malpurigado de la vivmedio, precipe de akvoj, influas ankaŭ la vivon de niaj libeloj. Ekzemple maldiklibeloj, kiuj estis ĉe niaj akvoj tre abundaj, estas nun relative raraj.